MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 2

Februaro 2017 Kol. 382/33

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Du datrevenoj, Kion aĉeti de 1914 La 32-a Arkones, Vitra tunelo, El la redakcio

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Du aĝsignifaj datrevenoj

Antaŭ du monatoj, meze de la pasinta decembro, nia organizo (kaj mi esperas, ke ĉiuj E-kluboj) festis la naskiĝdatrevenon de nia majstro Ludoviko Lazaro Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto. Proksimiĝas aprilo, kiam ni esperantistoj rememoros lin okaze de lia mortodatreveno, la 14-an de aprilo 1917.

La dua datreveno, rilate de nia Ludoviko, estas la tago, kiam la 26-an de julio 1887 li publikigis lernolibron de Esperanto unue en la rusa lingvo.

Kion ni en Ĉeĥio povis aĉeti de la jaro 1914 por la sama monero

La kvindekhelera monero estis elkursigita la 31-an de aŭgusto en la jaro 2004. Unu 0,50 Kč monero pezas 0,9 gramojn. Por la ŝanĝo la homoj havis unu jaron.

La ĉeĥa nacia banko skribis, ke la entuto de tiuj moneroj estas preskaŭ 410 milionoj. La tuta pezo de ĉiuj kvindekmoneroj estas proksimume 369 tunoj.
La monero estas produktata el alojo de aluminio kaj magnezio. Ĝin projektis Vladimír Oppl. En la kazo, ke tiu ĉi kvanto povus esti ŝarĝita sur kamionoj, estus necese havi preskaŭ 20 kamionojn.
Kion ni povis aĉeti per unu kvindek helera monero?

En la j. 1914: 3 litrojn da lakto, kvaronon de kilogramo da butero.
En 1924: unu kolbaseton, kornbulkon kaj malgrandan bieron (1/3 de litro)
1934: 10 dekagramojn da praga ŝinko
1954: malgrandan bieron kaj bulkon
1964: gulaŝan supon
1974: etan porcion da glaciaĵo
1984: ĵurnalon Rudé právo aŭ alian ĵurnalon
1994: skatoleton de alumetoj
2004: nenio estis aĉetebla

La fonto: ĵurnalo Šíp

La 32-a Arkones 23. - 25. 9. 2016

La antaŭlastan semajnon de septembro jam la 32-an fojon okazis en Pollando en la urbo Poznano la tradiciaj ARtaj KONfrontoj en ESperanto (ARKONES). La aranĝo okazis en fervojista kulturdomo tute proksime de la bela urbocentro. Partoprenis ĝin 208 esperantistoj el 21 landoj.

En la tri tagoj la organizantoj sukcesis proponi riĉegan programon: tridekon da prelegoj, filmoj, koncertoj, spektakloj kaj aliaj prezentadoj.
En la koridoro la partoprenantoj povis rigardi ekspozicion

"Woodstock 2016 - Multkultura Vilaĝo". La nivelo de la prezentitaj programeroj estis alta danke al la kontribuo de konataj profesoroj kaj eminentuloj el la interlingvistikaj studoj ĉe la universitato UAM de Poznano, kiuj la aranĝon partoprenis. La libroservo proponis librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Surloke funkciis bufedo kun kafejo, kie la ĉeestantoj povis refreŝiĝi per biero kaj ne tro koste manĝi.

Listigo de programeroj ne sufiĉas por priskribi la tutan aranĝon. Okazis primovada kunveno de la pola E-junularo, kurso pri unua helpo. Estis prezentita la libro "Memoraĵoj de kampara knabo". Oni parolis pri la greka krizo, pri lingva diverseco, pri apliko de la 15-a regulo, pri bliss-a skribo, pri feroaj dancoj kaj spritaj splitoj, pri “Beletra Almanako”, pri amo de la vidpunkto de psikologo, pri projekto de Esperanto-domo en Katmanduo, pri sekreto de abeloj, pri kuirarto de la antikva Romo kaj pri aliaj interesaj temoj. Paralele kun Arkones okazis unu-semajna trejnado konektita kun la projekto ERASMUS+ en kiu partoprenis 3 germanoj, 3 slovakoj kaj 7 poloj. Ĝi estis gvidata de Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge. La projekto celas eduki venontajn instruistojn kaj aktivistojn de Esperanto. Tre grandan sukceson havis la teatraĵo "La kredito" prezentita de Georgo Handzlik kaj Saŝa Pilipoviĉ.

Pri meritoj de Michel Duc Goninaz kaj Detlev Blanke, kiuj je ĉies bedaŭro forpasis pasintjare, omaĝis Ulrich Lins, Barbara Pietrzak, Probal Dasgupta kaj Katalin Kováts subgvide de Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor. Sojle de la Zamenhof-jaro 2017 parolis Barbara Pietrzak kaj pri digna festado de la sama afero internacie en Germanio kaj Pollando parolis Johano Pachter.

La organizantoj zorgis pri altnivela muzika programo okazinta en la granda salono *Spegulejo.* Ni spektis koncertojn kaj aliajn amasajn

aranĝojn kiel ĉendancado kaj filmprezentadoj.

La unuan vesperon ni povis aŭskulti altnivelan pian-koncerton de Joachim Kol-panowicz.

S-ano Mikaelo Bronŝtejn prezentis kantojn de rusiaj bardoj kaj Tomio Frejarö gitarludis kaj kantis. La sekvan tagon prezentiĝis kaj koncertis sur scenejo la ensemblo "E-familio kaj Gosia Sarata", kies junulara parto kantis kelkajn kantojn kaj kantigis la publikon per popularaj konataj kantoj.

Dum la tradicia mielvespero ni estis regalitaj per medo. Varia prezentado de muzikaĵoj ne elrevigis la partoprenantojn kaj instigis ilin al dancado ĉe la fino. Prezentiĝis arkonesa koruso, kantis Zuzana Kornicka. El Berlino venis la ensemblo "Klezmorim Sennomaj" kaj la vespero finiĝis per energiplena koncerto de la duopo Slezak.

ARKONES estas festivalo, kiun partoprenas konataj artistoj el Esperantujo kaj la vesperaj programeroj abundas pri kvalitaj koncertoj. Ĝi estas etos- kaj kulturplena aranĝo. Al la bona evento kontribuas ankaŭ la kutime belega aŭtuna vetero.

Liba Gabalda

Vitra tunelo sub fiŝlago en Moravio

Ne, vi ne estas en Dubajo, Sidnejo eĉ ne en Colombo, kie eblas pere de vitra tunelo observi ŝarkojn aŭ rajojn nur kelkajn centimetrojn de nia vizaĝo. En la moravia urbeto Modra, proksime de la fama kuracloko Luhačovice, vi povas sub la akvonivelo observi huzon grandan, la plej grandan dolĉ-akvan fiŝon de la mondo. En la plej

granda tunelo, konstruita en dolĉakvo, en geografia teritorio, kie vintre frostas. La spiron vi iom haltigos, ne pro manko de la aero, sed pro surprizo!

Kiam la vilaĝestro de tiu ĉi moravia vilaĝo elpensis projekton de dolĉa akva kaj botanika ekspozicio „Viva akvo“, multaj opiniis lin frenezulo. Sed ankaŭ ili konis lin, ja li tie ĉi „estras“ jam kvaroncentjaron.

„Iam tie ĉi estis vitrodomegoj kaj hortikulturejo, devene marĉoj kaj fiŝlagoj, troviĝas tie ĉi fontoj de subtera akvo“, prezentas la komplekson „Viva akvo“ Miroslav Kovařík. Al la areo dominas ĉefdomego ĉirkaŭigita naŭdek procente per akvo. Estas tie 850 kubometra fiŝlago kun fiŝoj, sub ĝia akvonivelo troviĝas la tunelo.

Plu tie estas naĝ-biotopo kun 1 620 kubometroj da akvo, purigata de radikoj de kreskaĵoj. „Ni posedas la plej altkvalitan akvon en larĝa ĉirkaŭaĵo“, fiere klarigas la vilaĝestro.

Antaŭ la ĉef-konstruaĵo troviĝas „Avina ĝardeneto“, tipa slava antaŭĝardeneto, kiu pasinte plenumis ornaman kaj utilcelan funkcion. Oni povas flari lavendon, menton, melison, hisopon…
Apude situas marĉa lageto, en kiun enfluas rivereto kun akvofalo. En la lageto vivas rara testudo marĉa – unusola devena speco de la ĉeĥa teritorio. En subtera parto de la domo oni povas observi la vivon en la rivereto, akvon, kie vivas timaloj kaj salmonoj.

„La Viva akvo“ simple prezentas vivon en la akvo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kun akvo-animaloj kaj kreskaĵoj de rivero Morava, riveretoj kaj lagetoj.

„La fiŝoj estas tipaj por tiu ĉi regiono, ranoj ĉi tien transloĝiĝis mem,“ klarigas la vilaĝestro.
La ĉefkonstruaĵo estas iama fiŝkaptista bastiono kaj la aŭtorino de logotipo estas knabino, disleksia lernantino. La logotipon oni elektis el cent tridek desegnaĵoj de lokaj lernantoj. „La tuta komplekso estas komuna, kune kun la slovaka komunumo Uhrovec,“ diras Miroslav Kovařík.
„Kune kun Uhrovec ni jam kunlaboris ĉe sep projektoj kadre de Granda Moravio. Laŭ rompita sonorilo el la naŭa jarcento, trovita en Slovakio, ni fandformis novan.“
Kiam la „Vivan akvon“ vidis la reĝisoro, esplorvojaĝanto, verkisto kaj subakviĝanto Steve Lichtag, konata aŭtoro de filmoj pri mortigado de balenoj fare de japanaj fiŝkaptistoj, pri grandaj blankaj ŝarkoj, fondinto de la internacia film-festivalo Akvo – maro – oceanoj, li estis fascinita. „Li tie ĉi staris kun pokalo da vino kaj ĉiuj atendis, kion li diros. Momenton estis silento kaj poste li diris, ke li ne povas paroli – tiel li estis kortuŝita. Li traveturis la tutan mondon, sed tio ĉi ekzistas nur en eta moravia vilaĝo. Nekredeble.“ Rememoras la vilaĝestro. „Laboris tie ĉi ĉiuj: enloĝantoj, vilaĝanoj de najbaraj vi-

laĝoj, fiŝkaptistoj, amikoj, grandan parton de la kreskaĵoj plantis infanoj kaj handikapuloj el la proksima urbeto Velehrad.“

La ok metra vitra tunelo situas 3,5 metrojn sub la akvonivelo de la lago. Maldekstre flosas fiŝoj malvarmon ŝatantaj, dekstre vivas fiŝoj, kiuj la varmon ŝatas.

„Ni havas silurojn, angilojn, tinkojn, sturgojn… Ho, vidu, tio estas la dudekjaraj huzoj Jura kaj Mira,“ indikas la vilaĝestro la plej grandajn fiŝojn.

En la unua subtera etaĝo estas sur la muroj kontakta ekspozicio – maketoj de fiŝoj kun karakterizaj atributoj kaj la nomoj estas signitaj per brajla skribo. „La maketojn faris keramikistino, ili estas lokitaj laŭ zonoj – fiŝoj de grundo, fiŝoj de akvo-kolono, fiŝoj de akvonivelo.

Unu etaĝon pli sube eblas observi la lagon en profundo 6,5-metra, ŝatata loko de siluroj, sturgoj kaj vintra loĝregiono de plejparto da fiŝoj. La tiel nomata kontakta ekspozicio prezentas ankaŭ fiŝojn el fremdaj landoj kaj kontinentoj. Ekzemple sunperko, karaso ora, silureto amerika.

De antaŭ tri jaroj funkciante la areo „Viva akvo“ estas malfermita eĉ vintre krom lundo. „Eĉ sub la glacio estas belege,“ diras la vilaĝestro. La lokon vizitadas proksimume 180 miloj da vizitantoj dum la jaro. Ni aranĝas ankaŭ prezentaĵojn kun subakviĝanto, kiu naĝas kun huzoj kiel kun delfenoj. „Ni estas eble la

unusola vilaĝo en la Ĉeĥa respubliko, kiu povas laboron doni al sub-akviĝanto.“

Fonto: Blanka Stuppacherová, Pravda sk.
E-traduko Pavel Nechvíle

El la redakcio:

1) La estraro de nia asocio finpreparas rekonstruitajn retpaĝojn, do ni rekomendas al vi rigardi ilin. Viajn konsilojn ni volonte akceptos.
www.esperanto-aeh.eu

2) Nur du monatoj mankas ĝis la komenco de nia 7-a internacia kongreso de AEH, kiu okazos en la Kasteleto Hodonín ĉe la urbeto Kunštát. Post la dutaga kongreso sekvos lingva seminario (anstataŭ en Skokovy) kun kelkaj interesaj ekskursoj. Vi povas jam aliĝi rekten al la kongreso sur niaj retpaĝoj. Aliĝu frue! red.

Citatoj:

Oni diras, ke la mono ne alportas feliĉon. Sendube oni pensas pri la mono de aliaj homoj.
Imagu la silenton, se la homoj dirus nur tion, kion ili scias.
Pensu je hodiaŭa tago, ĉar ĝi jam neniam revenos.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.